James Krüss,

# Marmelade Schokolade

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

. . .

James Krüss,

# Marmelado, ĉokolado

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Marmeladon,[3]
ĉokoladon,
ĉion vendas mi!
Kaj sukeron
kaj buteron
povas havi vi!

Prem-butonojn
kaj kalsonojn
trovas vi en la
magazeno.
Da fadeno
estas tiom ja!

Bird-manĝaĵo
kaj frandaĵo,
sal' kaj gras' kaj gri',
bona pano
por la sano
estas tie ĉi!

Sinjorino
aŭ fraŭlino,
servas mi nur vin![4]
Varo mia estu via!
Vi aĉetu ĝin!

. . .

[3] aŭ:
Marmelado,
ĉokolado
estas tie ĉi!
Kaj sukeron
kaj buteron
povas havi vi!

[4] aŭ:
Sinjorino
aŭ fraŭlino!
Vin nur servas mi!
Varo mia
estas via,
se aĉetas vi!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* James Krüss *(Jakobo Krujso, ∗1926-05.31 – †1997-08.02).*

*Arg-665-1334 (2012-11-20 17:59:49)*

*Pri la aŭtoro vidu la vikipediajn retejojn* http://de.wikipedia.org/wiki/James_Kr%C3%BCss *kaj* http://www.jameskruess.de/.

*Traduko de la Germana poemo "Marmelade Schokolade" de* James Krüss *(Jakobo Krujso, ∗1926-05.31 – †1997-08.02) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984-05.*

*MR-083-3 / Arg-665-1335 (2012-11-21 09:33:09)*